




Morfologio kaj fiziologio de la plantoj

De **Karulo (Karles) ***
18a de Decembro 2015



Planto konsistas el du partoj, tiu aera kaj tiu subtera.

Radiksistemo

Radiksistemo estas tiu subtera parto de la planto. Ĝia funkcio estas fiksi ĝin kaj nutri.

Partoj de la radiko:

Kolo: ĝi situas ĉe la surfaca nivelo de la grundo kaj disigas trunkon disde radikoj.

Ĉefradiko: subtera parto el kiu eliras akcesoraj radikoj.

Absorbaj haroj: kanaloj per kiuj eniras la akvo kune kun la mineralaj substancoj kiuj nutras la planton.

-La disvolvado de la radikaro estas proporcia al la temperaturo. Temperaturo inter 10 kaj 15 gradoj celsiusaj favoras al kreskado de radikoj kaj temperaturo sub 6 gradoj celsiusaj malpliigas la disvolvado.

-Tro da akvo malrapidigas la kreskadon, kiu misefikas poste dum la kultivado.

-Fekundeco de la grundo ankaŭ influas en la disvastiĝo de la radiksistemo. Deficito de nitrogeno aŭ fosforo potencigas la gravecon de la radikoj. Tamen ne la manko de kalio.

-La absorbado de nutraĵoj tra la radikoj estas kondiĉigita de la temperaturo.

-Ĝenerale, la radika kreskado finiĝas kiam komenciĝas la formado de fruktoj. En tiu momento ĝi komencas degeneri.

Aersistemo

La aersistemon formas la tigo, la folioj kaj la floroj.

Tigo: La funkcio de tigoj estas teni la organojn de la vegetaĵo (folioj, floroj kaj fruktoj) kaj konduki la sevon de la radiko ĝis la folioj. Ekzistas du tigotipoj: ligna (malmola kaj rigida) kaj herbeca (mola kaj fleksebla).

Dependante el la tipo, la plantojn oni klasigas kiel arboj (branĉoj kreskas malproksime de la grundo kaj ilia alteco estas super 5 metroj), arbedoj kaj arbustoj (kiuj disbranĉiĝas ekde la bazo kaj estas pli malaltaj ol 5 metrojn) kaj herboj (fleksebla tigo kaj tre malaltaj).

Folioj: Organoj kiujn la planto uzas por spiri kaj efektivi la klorofilan funkcion.

Funkcioj de la folioj:

Spirado: kiu konsistas el absorbado de la atmosfera oksigeno kaj eligo de karbona dioksido. Ĉi funkcio okazas ĉefe dum la nokto.

Ŝvitado: eligo de preterbezona akvo de la folioj tra la stomoj.

Klorofila funkcio: ĝi konsistas el absorbado de karbona dioksido de la aero, pere la la


Komenco

Plej malnova ▶

Artikoloj de Karulo (Karles) *

▶ **Morfologio kaj fiziologio de la plantoj** - 18a de Decembro 2015

NE LEGITA **Plena Misilustrita Vortaro Desperanto** - VORTARO
Aliĉito : Folieto fabrikita el liĉiselo kiu permesas la partoprenon en ĉinaj... - 14a de Decembro 2015



Les notes de Dorian Gray - (font del text: El
relat de Dorian Gray) Si estàs pensant en fer
alguna feina do... - 19a de Aŭgusto 2015

Vidi ĉiujn artikolojn...

Etikedoj

plantoj · planto · fiziologio

Permesoj, permesiloj

🔒 Videbla de: Ĉiu (publika).

🔒 Atribuo + Nekomerca + Kun sama permesilo

📊 37 vizitoj

🚩 Flagi nedezirinda

lumo; poste ĝi estas malkomponita, liberigante oksigenon.

Floroj: specifa organo por la reproduktiĝo de la planto. Ĉe la supro de la stameno deponiĝas la poleno kiu fekundigos la ovulojn (ovario) situanta en la interno de la karpelaro (gineceo). Post la fekundiĝo, formiĝos la frukto aŭ semo.

★ Cyril Vergnaud tre ŝatis tiun ĉi artikolon

Komentoj

+ aldoni komenton



Estu la unua, kiu komentas

AFIŜI

Antaŭrigardo (agordoj)

RSS-fluoj

Plej novaj komentoj – Abonu la komentofluon de tiu ĉi artikolo.

ipernity © 2007-2015

[Helpe kaj kontakto](#) |
 [La blogo de la ipernity-teamo](#) |
 [Pri ipernity](#) |
 [Dankon!](#) |
 [La Klubo ipernity](#)

Trovu nin en:

Facebook

[Gvidilo pri bona konduto](#) |
 [Grupaj gvidlinioj](#) |
 [Privateca politiko](#) |
 [Kondiĉoj por uzado](#)

Google +

[ipernity por iPhone / iPad](#) **NOVA** |
 [ipernity por Android](#) **NOVA** |
 [Spaco de la programistoj](#)

Twitter

Lingvo

Esperanto ▼